

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio, pri la vivo en Esperantujo.

Sinjoro Gaston Vidal, fidela aŭskultanto en Clermont-Ferrand (Francujo), avertis nin, per detala kaj afabla letero, pri eraro, kiu okazis la 20-an de novembro. Anstataŭ disaŭdigi mian prelegon pri Edmond Privat, operatoro erare disaŭdigis ital-lingvan rakonton pri la svisaj artefaritaj lagoj. Kiam oni konas la malsimplan laboron de radio-disaŭdigisto, kiu ĵonglas la tutan tagon kun plej diversaj sonbendoj, tiam oni facile pardonas erareton. Mi eĉ miras, ke tio okazas tiel malofte.

Sinjoro Gaston Vidal rakontas en sia letero pri la esperantista vivo en Clermont-Ferrand. En tiu urbo esperanto estas instruata en la Teknika Liceo Amédée Gasquet, en la Lerneja Asocio Jules Ferry kaj en la Teknika Lernejo Belle-Ombre. En Thiers, najbara urbo, nia lingvo estas ankaŭ instruata en Teknika Liceo. Eble kelkaj gelernantoj el tiuj kursoj nin hodiaŭ aŭskultas. Ni do profitas diri al ili nian amikan saluton.

La instruado de esperanto en la lernejoj ankaŭ estas aktualaĵo en Svislando. Mi hodiaŭ raportos al vi pri la kvina manifestacio **Esperanto en la lernejoj**, kiu okazis pasintan monaton en la urbo Neuchâtel.

Dank'al la sindono de helpemaj samideanoj interesa ekspozicio pri **Edmond Privat kaj Charles Ecabert, du pioniroj de esperanto en la lernejoj** prezentis per grandaj fotoj, tekstoj kaj diversaj dokumentoj : manuskriptoj, libroj, rememoraĵoj, la vivon de niaj du samideanoj, kies voĉon vi aŭdis ĉe nia radio.

Tiu ekspozicio estis organizita en la Supera komerca lernejo, kiu dum du tagoj nin gastigis senkoste. Tre granda publiko alkuris el plej diversaj partoj de nia lando por ĝin viziti. Intervjuistoj venis el la nomo de la radio, televido kaj ĵurnalistoj. Ili sin dokumentis pri la laboro de Esperanto-Edukistaro de Svislando.

La Universitato de Neuchâtel ankaŭ invitis nin. En ĝia granda prelegejo ni povis aranĝi gravegan manifestacion. Tiu ĉambrego estis plenplena. D-ro Pierre Bovet, iama profesoro en la universitatoj Neuchâtel kaj Ĝenevo kaj hodiaŭ honora direktoro de Universitata Instituto Rousseau, kies fako estas eduksciencoj, rakontis humure siajn unuajn kontaktojn kaj sian kunlaboron kun Edmond Privat, kiu en sia juneco estis konata pro sia impertinenteco. Profesoro Pierre Raymond-Sauvain kaj redaktoro Eric Descoeudres prezentis aliajn aspektojn de la vivo kaj penso de la biografo de Zamenhof kaj Gandhi. Freŝan noton alportis 50 gelernantoj el mia vilaĝo La Sagne. Ili recitis famajn poemojn de Edmond Privat kaj kantis, ĉiam en esperanto, du belajn dancojn de Schubert. Iliaj entuziasmo kaj talento certe konvinkis la plej dubemajn spektantojn pri la valoro de nia idealo. Poste mi havis la taskon prezenti la latiniston, kiu tiom batalis por esperanto. Charles Ecabert estis tre fama, ĉar li ne nur instruis la latinan lingvon, li ankaŭ kapablis ĝin flue paroli. Tio estas raraĵo en la dudeka jarcento. Nia samideano estis poeto, kiu en tre belaj versoj celebris la geniecon de Mistral, kiu revivigis la provencan lingvon. Li ankaŭ estis talenta muzikisto. La tenoro Olivier Tzaut kantis lian *Pange lingua*, latina procesia marŝo, kaj la publiko estis forte impresita. La direktoro de la Supera komerca lernejo de La Chaux-de-Fonds, d-ro Paul-Henri Jeanneret, prezentis la programon de fondaĵo Charles Ecabert, kies celo estas anstataŭigi la hazardon, kiu ĝis hodiaŭ gvidis gejunulojn al esperanto, per sistema prospektado. Por tio ĉiuj gejunuloj de la kantono Neuchâtel, kiuj finis siajn gimnaziajn, komercajn aŭ metiajn studojn, ricevos cirkuleron kun objektiva informado pri la progresoj de nia lingvo. Tiu cirkulero enhavos kuponon por senkosta akiro de gramatiko. La interesuloj nur bezonos doni sian nomon kaj adreson por ĝin ricevi. Tiu fondaĵo tuj ricevis la apogon de multaj lernejdirektoroj, de konataj altranguloj kaj de tre diversa publiko. La gazetaro raportis tre pozitive pri ĝi. Sendube dank'al tiu fondaĵo la

monda lingvo rapide disvastiĝos ĉe la junularo de la kantono Neuchâtel, kaj el tie radios en la tutan landon. Fraŭlino Danielle Béguin, fama pianistino, malfermis kaj fermis tiun gravegan manifestacion per pianludo, kiu reliefigis la gravecon de la pritraktitaĵoj.

Diversaj aliaj aranĝoj altiris dum tiu semajnfino vastan publikon. S-ro René Gacond, ornitologo, prezentis mirinde belajn diapozitivojn pri la mistera vivo de la birdoj de la regiono. Lian prelegon tradukis Claude Piron, tradukisto ĉe Mond-Organizaĵo por Sano. La dimanĉon la protestantoj aranĝis du-lingvan diservon esperanto-francan. La esperanto-kurso vekis tiom da intereso, ke Michel Frésard, la nova prezidanto de Esperanto-Edukistaro de Svislando, devis instrui la elementojn de nia lingvo al okdeko da atentemaj ĉiuaguloj. Prelego pri la monda federalismo permesis ekkontaktojn kun ne-esperantistaj organizaĵoj, kiuj sendis raportantojn. Kaj la dimanĉa posttagmezo, kies temo estis *Ferioj en Esperantujo*, permesis vidi diapozitivojn el plej diversaj mondpartoj.

Malgraŭ konstanta prelegprogramo nia ekspozicio devis resti konstante malfermita. La vizitantoj senĉese renoviĝis. Verŝajne la vizitintoj instigis siajn konatojn veni ĝin rigardi. La libro-vendejo vendis librojn por pli ol 500 frankoj : ĉu verkojn de Edmond Privat, ĉu esperantaĵojn.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond raportis pri la vivo en Esperantujo.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-